



Septembro-Oktobro 1955, Nroj 1-2.

LA JUNA VIVO

MONATA GAZETO DE „TUTMONDA ESPERANTO-JUNULAR-ORGANIZO“

Redaktejo: S-ino E. Burgler, Amsterdam-W., Overtoom 4352

Administrejo: F-ino C. van Spengen, Hilversum, Loosdrechtseweg 55

Giro de TEJO por Nederlando: 537168 Jarabono 3 ned. guld. aŭ egalvaloro

NIA UNDEKUNIA INTERNACIA JUNULARKUNVENO.

En la rava pejzaĝo de la Apenina montaro, en la mezepoka urbo L'Aquila disvolviĝis de la 7a ĝis la 14a de aŭgusto nia 11a IJK, kiun partoprenis proksimume 250 gesperantistoj, el kiuj la plimulto estis gejunuloj.

La kunsido por la solena malfermo komenciĝis dimanĉon je la 12a kaj duono en la Urba Teatro. Prezentita al la ĉeestantaro de samideano Giorgio Bronzetti, prezidanto de la Organiza Kongresa Komitato, la urbestro de L'Aquila, adv. Colagrande, tiel parolis (en itala lingvo):

„Via Moŝto, Gesinjoroj, al la junaj eŭropaj Esperantistoj kiuj elektis L'Aquila por la 11a internacia kongreso mi havas la devon alporti, kune kun la plej varma danko por la elekto de ĉi tiu urbo kiel sidejo por sia kunveno, la plej koran saluton de la urbo mem, kiun mi nun havas la honoron reprezenti. La kunveno sekvas tiun okazintan dum la lastaj tagoj en Bolonjo, la 40an de la pli granda organizo, la Universala Esperanto-Asocio, en kiu estis diskutataj kun la partopreno de 2000 delegitoj el 36 landoj kaj kun la ofi-

ciala reprezento de 14 registaroj, inter kiuj la itala, la problemoj, kiujn la Esperantista propagando starigas kaj klopodas solvi por funkciigi por la disvastigo de la kulturo, de la scienco, de la edukado tra la popoloj la lingvan universalecon. Tio emas difini kiom tiuj ĉi kunvenoj estas taskoriĉaj kaj kiom multe atendas tiuj ĉi pioniroj kaj kiom do devas esti ĝoja ĉi tiu urbo, danko al la organizintoj, kiuj volis porti ĉi tien la blovon de tiu movado, kiu sin direktas, per starigo de komuna helplingvo, al celo kies graveco estas internacia por la interfratigo de la popoloj, por la ebleco de tiu interparolo inter diversaj gentoj, per kiu eblas pli facile interkompreniĝi por efektiviĝi pli bonan komunikigaĉadon kaj tial pli pacan kunvivon. Ne estas mia la tasko, nek mi kapablus ĝin digne plenumi, rememorigi la ĉefajn fazojn de la Esperantista movado, de kiuj ĝi antaŭeniris la unuajn paŝojn pro la sindono kaj la fido de la pola kuracisto Zamenhof ĝis la nuna rezolucio, per kiu U.N.E.S.K.O. rekonis la valoron de Esperanto kaj akceptis la Universalan Esperanto-

Asocion kiel konsultmembron. Estas veraj gigantpaŝoj, ĉe kiuj oni devas reliefigi, ke ĉi tiu universala lingvo estas konstruita laŭ akurate fiksita plano respondanta al praktika vivebezono, kio pensigis iun, ke ĝi, pli ol estis artefarita, jam ekzistis kiel tutmondidiomo, tiel ke oni devis nur ĝin elserĉi kaj reguligi. Mi volas nur ektuŝi tiun problemon, pritraktotan dum ĉi tiu kunveno ankaŭ fare de fakuloj kaj interesiguloj. Ĉi tie sufiĉas, ke mi iom ĝin priparolis por elmontri la grandan seriozecon de tiu movado, por diri al vi, ke ĝi interesis multajn grandmensajn klerulojn, ke ĝi ampleksas ĉiam pli vastigantajn proporciojn, ne nur en la kultuskampo, sed ankaŭ en la praktika, favorente la interrilatojn inter diversnaciaj popoloj. Pro tio la urbo sentas sin ankoraŭ pli nobligita pro la elekto kiun vi faris por ebligi al ĝi la redonon de la propono per tiu bonveniga gastamo, kiun laŭ mia espero vi trovos en ĝi, en tiu ĉi L'Aquila nia, enfermita en la rava krono de niaj montoj, severstila en siaj monumentoj, bela kaj ĉarma en sia gracio, forta en sia videbla esprimo, sed ĉefe sopiranta doni al si kaj al la mondo ateston pri kompreno tuteca, evidenta, solena de tiuj idealoj de frateco kaj solidareco kiuj enestas en via ekzistokaŭzo mem. Pro tio, mi rediras, la urbo salutas vin plej varmsimpatie kaj direktas al vi bondeziron pri ĉiam pli bela sukceso. Ĉi tiu bondeziro estas ĉefe por vi, gejunuloj, kiuj portas en ĉiu via aktivago vivsenton kvazaŭ religian, kiuj alportas ĉiam novajn demandojn kaj ideojn, kiuj plenumante viajn taskojn ekhavas ĉiam pli la konsciencan pri viaj devoj kaj via respondeco. Ankaŭ ĉi tie en la disvastigo de komuna idiomo vi direktiĝas al la formado de tiu ligilo kiu super la naciecoj

kaj la naciaj postulemoj vivtenas la esperon kaj ekvidigas en la estonteco la progreson de la institucioj internaciaj kaj supernaciaj, kie praktika, tuŝebla, ĉiama preter ĉiu interkonsentita senkonkretaĵo estas ĉi tiu lingvo donanta al la interrilatoj daŭron, tutecon kaj konsiston. Jen la deziro, per kiu L'Aquila vin akompanas dum viaj laborkunsidoj." (Aplaŭdoj)

Poste, ankaŭ prezentita de Giorgio Bronzetti, la deputito Lorenzo Natali, subministro pri informservo, eldono kaj radio tiel parolis (itale):

„De la 31a de julio ĝis la 6a de aŭgusto okazis la 40a universala kongreso de Esperanto, kiu disvolviĝis en la majesta ĉambrego de la fama Universitato de Bologna; dum tiu kongreso parolis la veteranoj kaj la pioniroj de la zamenhofa lingvo, prezentis siajn klerajn prelegojn profesoroj el pluraj universitatoj en la tuta mondo per unu sola lingvo, Esperanto. Hodiaŭ ĉi tie en L'Aquila okazas kunveno ne malpli grava, la 11a internacia esperantista junularkunveno (T.E.J.O.); al tiu ĉi kunveno mi alportas nun mian personan saluton de akŭilano ĝoje vidanta sian urbon elektita por tiom grava okazaĵo, kaj de la itala Registaro, kiu estas feliĉa donante al vi per mi sian plej varman bondeziron por ke ankaŭ per vi la homaro trovu komunan sferon, kie ĉiu estus pli facile kapabla por efektiviĝi en libero kaj bonstato sian moralan, politikan, socian progreson (Aplaŭdoj); kaj Esperanto estas unu el la ĉefvojoj por atingi ĉi tiujn vere homarecajn celojn, kaj pro tio via alia asocio estas proponita por la Nobel-pacpremio. Tial Esperanto kaj la Esperantistoj ĉiam trovis la rimedojn, pri kiuj disponas la nuntempa civilizo, tre valoraj kunbatalantoj kaj

helpiloj; trian saluton, krom mia persona kaj tiu de la Registaro, mi prezentas al vi ĝuste je nomo de la inform- kaj presoficejoj dependantaj kaj kontrolitaj de mia subministrejo; kaj por pravi al vi la simpaton per kiu via aktiveco estas akompanata, permesu, ke mi pluparolu pri kiom la itala Radio, ankaŭ hodiaŭ ĉi tie ĉeestanta per siaj mikrofonoj, volis agi por pli larĝa disvastiĝo de via lingva movado. De post 1925a okazas la dissendoj el Roma en Esperanto; la unua periodo fermiĝis pro la dua mondmilito, sed tiom frue kiom ni povis, tio estas la 16an de junio 1950a, la Esperantaj dissendoj rekomenciĝis per mallongaj ondoj du fojojn semajne dum po 20 minutoj. Niaj radiodissendoj elvokis aplaŭdon kaj konsenton el ĉiuj radioaŭskultantaj Esperantistoj: alvenis al ni leteroj el ĉiu lando, el la malproksimaj Amerikoj, el Nov-Zelando, el Rusujo, el Litovujo, el Ĉeĥoslovakujo, el Hungarujo, el Proksimoriento kaj Mezoriento krom el ĉiuj eŭropaj landoj. Esperanto enportis en la koron de la aŭskultantoj la fratecan senton, enportis la latinan civilizon, instruis la gloriojn de Romo kaj de Italujo, elmontris la rekonstruan streĉon faritan de la itala popolo, donis senton de nova vivo al ĉiuj kiuj estis forrabitaj de la internacia Esperanto-movado. Al tiuj alvenis perradie la parolo de Romo, la instruado de la latinaj kaj italaj poetoj; per Esperanto oni estas etendinta fratan manon al ĉiuj popoloj ĉiurasaj, ĉiureligiaj, ĉiulingvaj, ĉiuideaj, ĉiujn retrovante en pli ampleksa bildo de la homaro. La Itala Radio lasis al la kunlaborantoj de la roma stacio la eblecon pritrakti plej variajn temojn, por ke la dissendoj estu ĉiam pli diversistemaj, interesaj, instruaj. La korespondaĵoj, kiuj ĉiutage nin atingas,

montras al ni, ke la celo estas atingita, kaj okaze de la 500a dissendo disradiita post la lasta milito, dissendo okazinta la 1an de aprilo ĉijara, ĵurnaloj, gazetoj kaj esperantista mondo sendis siajn gratulojn al niaj elsendostacioj: estis internacia konsentpruvo kiu nin kortuŝis. Mi certigas vin, Esperantistoj ĉi tien kunvenintaj, ke Radio Roma daŭrigos siajn dissendojn por ke tiu ĉi lingvo vivu kaj disvastiĝu inter la filoj de ĉiuj popoloj; ni daŭrigos ĝin disvastigante per la radio, aliaj homoj penos enkonduki ĝin en la lernejojn, kie troviĝas la plej bona fermento de la morgaŭa homaro. Kaj al tiu laboro ni dediĉos nin per nia tuta entuziasmo kaj nia tuta sindonemo, des pli multe ĉar U.N.E.S.-K.O., per sia rezolucio unuanime (evidente nepreciza informo) voĉdonita la 10an de decembro lastjara en la plenkunsido de Montevideo, konstatis la rezultojn atingitajn per Esperanto en la kampo de la internaciaj kulturinterŝanĝoj kaj por la interproksimigo de la popoloj en la mondo, konstatis, ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj al la idealoj de U.N.E.S.K.O. mem. Post longa daŭro de timoj kaj senkuraĝigoj, post jaroj da angoro ni hodiaŭ ĉeestas refloradon de la plej homaj pacesperoj. Kiel kaj kiam tiuj esperoj povos esti realigataj kaj fariĝi certiga sekureco, ni ne scias, sed nin akompanas dum la ĉiutaga antaŭeniro penanta superi la nunajn malfacilaĵojn neŝancelebla fido je la saĝo de la popoloj kaj je la dia providenco. La homarhistorio ĝuste el tio konsistas, saĝo kaj fido, kaj kiom estas saĝaj kaj fidoplenaj vi, Esperantistoj, kiuj dum la mondo frenezis kaj sin memdetruis estas konservintaj viajn esperojn al pli bona homaro senŝanĝaj, ŝajnas al mi senutile substreki. Ho-

dlaŭ la internacpolitikaj okazaĵoj
ŝajnas pravigi ĝuste tiujn kiuj ĉiam
esperis, do vin; Dio volu ke nenio
el viaj kaj niaj penoj perdiĝu por ke
la homaro paciĝu kaj retrovu la vo-
jon al la justeco kaj al la libero.
Sur ĉi tiu vojo, kie kun tiom da sin-
dono kaj malavara obstino de post
tiom da jaroj vi laboras, mi deziras
al vi ke vi rikoltu la merititan suk-
ceson. **Vivu Esperanto!**" (Ĉi tiuj du
lastaj vortoj estis elparolataj en Es-
peranto; tondra aplaŭdado ilin sek-
vis).

Ambaŭ paroladoj estis lerte resu-
mitaj Esperantlingve de Enrico Don-
di el Roma.

Poste la sekretariino de T.E.J.O.,
s-ino Burgler, tiel alparolis la ĉees-
tantaĵon:

„Karaj geamikoj, ni kunvenas ĉi
tie la 11an fojon, kaj antaŭ ĉio, an-
taŭ ol mi bonvenigas vin, ĉar vi
kompreneble ĉiuj estas bonvenaj, mi
bonvenigas niajn ŝatatajn gastojn al
nia malgranda kunveno Poste la prez-
idanto de la O.K.K. legos al vi la
nomojn de la honoraj komitatanoj,
ĉar estas ankaŭ honoraj komitata-
noj, kies nomojn vi ankoraŭ ne ko-
nas.

Ni ĉiuj ŝuldas grandan dankon al
O.K.K. Kiam mi alvenis antaŭ tri
semajnoj ĉi tien, tiam mi ekkompren-
nis kian laboron faris ĉi tie en
L'Aquila manpleno da gejunuloj: ili
havis de ĉiuj flankoj helpon, sed ta-
men ili devis fari multan laboron,
multe pli ol ni perceptas, kaj tial ne
estu tre kritikemaj. Se vi havas kri-
tikojn, se vi havas plendojn, venu al
mi; se vi havas laŭdon, iru al ili kaj
diru al ili; estos por ili la plej bona
danko kaj la plej bona rezulto por
ilia laboro.

T.E.J.O. estas malgranda kaj mal-
forta, T.E.J.O. estis ankoraŭ neniam
tiom malgranda kaj tiom malforta

kiom nun. Tio devas ŝanĝiĝi; pri tio
mi parolas jam dum jaroj, kaj nun
espereble la lastan fojon mi tion ri-
petas.

Post la milito, kiam ni havis an-
koraŭ esperon, ke T.E.J.O. fariĝos
granda, ke niaj malnovaj anoj reve-
nos, ni vivis kun certa espero en la
koro. Bedaŭrinde ni devas konstati,
ke T.E.J.O. ne vivas, sed vegetas, eĉ
malpli bonan vegetadon ĝi havas ol
iu ajn planto. Tiun ĉi semajnon, kiam
ni iris por aranĝi ian ekskurson por
vi al Scanno, mi dumvoje kun ad-
miro rigardis al la krutaj, al la kru-
elaj montoj, sur kiuj preskaŭ ne es-
tis tero, sed jen kaj jen estis ver-
daĵoj; mi forte esperas ke niaj junaj
anoj perceptos, ke ankaŭ ili devas
simili al tiuj verdaĵoj, kiuj povas
kreski kaj povas resti verdaj eĉ sur
malfavora grundo, eĉ inter malfavo-
raj cirkonstancoj. Ni pli maljunaj
personoj multe laboras por T.E.J.O.;
ni laboras ne pro tio ĉar ni sentas
nin ankoraŭ junaj, sed ĉar ni reko-
nas, ke la junularo havas rajton je
propra loko, ni rekonas, ke la junu-
laro devas havi propran lokon en la
grupo de la grandaj Esperantistoj.
Tamen la junuloj montru, ke ili me-
ritas nian helpemon, ili montru, ke
ili estas sufiĉe vivopovaj, ĉar sen la
junularo ni povas nenion atingi. Ni
helpas la gejunulojn por ke ili mem
trovu la ĝustan vojon.

Ni kunvenis ĉi tien en L'Aquilo
kaj ni havas grandajn planojn, ni
multe ŝanĝos ne nur la konstitucion,
sed ankaŭ la konstrucion de T.E.-
J.O.; la junularo devas mem scii kaj
mem elekti la vojon, kiun ĝi volas
sekvi, la junularo mem devas preni
postenojn kaj la junularo mem devas
zorgi pri tio, ke ĝia unuiĝo, tio estas
la Tutmonda Esperanto-Junular-Or-
ganizo, estu granda. Vi povas diri,
ke dum jaroj mi faras nenion alian

ol petas, petas, petas; jes, mi petas, kaj nun mi denove petas: ĉiu ano alportu almenaŭ unu novan anon, almenaŭ unu, kaj tiam post unu jaro ni povos esti sufiĉe fortaj por ke ni akiru en la mondo tiun lokon, kiun ni T.E.J.O. nepre meritas kaj kiun ni nepre bezonas. Mi ne multe ĝenas vin ĉar ni ĉiuj estas lacaj. Nun la prezidanto de O.K.K., Giorgio, legos por vi kelkajn salutleterojn kaj kelkajn saluttelegramojn kaj poste venu la salutantoj el diversaj landoj por paroli. Jen la salutoj el diversaj landoj (Longaj aplaŭdoj). Ne aplaŭdu, sed laboru, kaj tiam mi aplaŭdos post unu jaro. Aplauĉo estas ĉiam sub la momenta influo. Ne aplaŭdu, sed laboru, laboru." (Aplaŭdoj).

Tuj poste samideano Bronzetti legas la nomojn de la anoj de la Honora Komitato, kiu konsistas el:

Prezidanto: deputito Giovanni Leone, prezidanto de la itala deputitaro;

Komitatanoj: Lia Moŝto d-ro Van Drees, ministroprezidanto de Nederlando; prof-ro Isbrücker, prezidanto de la Akademio de Esperanto; d-ro Lapenna, akademiano kaj komitatano de U.E.A.; prof-ro Privat, Honora Prezidanto de U.E.A.; inĝ-ro Jung; deputito Natali, subministro pri informado, eldono kaj radio; deputito Del Fante; adv. Colagrande, urbestro; adv. Vespa, vicurbestro; d-ro De Marinis, estro de la Provinca Turisma Oficejo; d-ro Tomassi, estro de la Sendependa Turisma Oficejo; la kvestoro; la ĉefepiskopo; la provincentro.

Sekvis la salutvortoj de la reprezentantoj de la landoj el kiuj venis la kongresanoj; la 249 aliĝintoj estis el: Aŭstrujo, Belgujo, Brazilo, Danujo, Egiptujo, Finnlando, Francujo, Germanujo, Italujo, Jugoslavujo, Ma-

roko, Nederlando, Sarlando, Svedujo.

Dimanĉon vespere okazis la Itala Festvespero en la Urba Teatro; la gejunuloj el L'Aquila vigle ludis, laŭ la prezentado de Giorgio Marinucci, vicprezidanto de O.K.K., prezentante kelkajn plej rimarkindajn apartajn ecojn de la ĉefaj italaj urboj. Estis speciale aplaŭdataj la kantistoj, kiuj proponis al la kongresanaro belan bukedon de italaj kantoj, kaj skizisto, kiu verve kaj sprite desegnis pri amuzaj temoj.

La matenon de lundo oni okupis por admiri la belaĵojn kaj la vicindajojn de nia kongresa urbo, pri kiuj niaj legantoj jam ion scias de la artikoloj publikigitaj en nia revuo; la amikoj el L'Aquila estis niaj simpatiaj kaj kleraj gvidistoj.

Posttagmeze s-ro Vilho Setälä faris tre belan prelegon pri finnaj poemoj, kaj vespere s-ro Tadros Megalili donis interesajn sciigojn pri la vivo en moderna Egiptujo. La paroladon de d-ro Megalli sekvis la Teatra Konkurso, kiun partoprenis 4 grupoj el Germanujo, Italujo kaj Jugoslavujo, prezentante skeĉojn originalajn aŭ tradukitajn. Kiel la komisiono disdonis la premiojn vi povos legi en sekvanta nro.

Mardon okazis la tuttaga ekskurso al la lago de Scanno kaj al la Nacia Parko de Abruco; la lago estas mirinde bela, kaj la lokaj kostumoj estas plaĉaj. La Nacia Parko prezentis al ni ravajn montajn pejzaĝojn kaj la „vivantan muzeon" de siaj animaloj, kiuj estas unikaj en la tuta mondo. La Folkloro Konkurso bedaŭrinde ne okazis pro manko de partoprenantoj.

Merkredon kaj jaŭdon okazis la jarkunsido de nia organizo, pri kiu ni ĉi tie ne raportas ĉar ĉiuj membroj ricevis aŭ ricevos stencilitan

protokolon verkitan de Heinrich Reiter kaj Nicola Minnaja, laŭ la stenografa raporto prizorgita de tiu ĉi lasta dum la kunsido mem. Ni nur atentigas pri la saluto al la I.J.K. de U.E.A., alportita de s-ro Tibor Sekelj, kaj pri tiu de la ĉeĥa Esperantistaro, alportita de s-ino Madeleine Haudebine. Dum la kunsido la perantoj faris siajn raportojn, kiuj pro teknikaj kaŭzoj ne povis esti enmetitaj en la protokolon; vi ilin trovos en alia parto de tiu ĉi numero.

Merkredon vespere ni ĝuis prezentadon de jugoslava grupo, precipe pri popoldancoj, kaj la vervan komikan talenton de teatroludisto de la Schwartzrupo. Ni admiris ankaŭ la ĉarmon, laŭ kiu gracia abruca knabineto deklamis italan poemon esperanten tradukitan.

Ankaŭ la trafa parolo de s-ro Tibor Sekelj nin allogis, kiam li rakontis pri siaj esplorvojaĝoj inter la necivilizitaj popoloj de suda Ameriko, kvazaŭ nin kondukante ĉemane tra la vojoj, kiujn sole li kaj lia malgranda akompanintaro konas, en la tuta civilizita mondo.

Jaŭdon okazis ankaŭ la sportaj konkursoj, en kiuj partprenis kelkdeko da junuloj el Aŭstrujo, Italujo, Jugoslavujo kaj Sarlando; la konkursoj konsistis el ĉi tiuj branĉoj: lancoĵeto, diskoĵeto, kugloĵeto, 100-metra kuro, 1500-metra kuro kaj altasalto. La rezultojn vi legos en sekvanta nro.

Vendredon okazis la tuttaga ekskurso al la Adriatika marbordo kaj al Pescara. La maro altiris la plimulton de la kongresanoj, kiuj trovis refreŝigon, post la longaj sed fruktodonaj kunsidlaboroj, en la bluaj ondoj; nur la novelektita estraro ne rajtis forgesi pri siaj devoj, kaj ankoraŭ kunsidis sur la alloga strando. En Pescara la kongresanoj

preskaŭ invadis la ĉefan lokan vizitindaĵon, la domon kie naskiĝis la fama itala poeto Gabriele D'Annunzio.

Vespere okazis la Kultura Vespere, organizita de Nicola Minnaja, kiu mallonge parolis pri la regiono Abruzzo kaj pri la urbo L'Aquila. Carlo Minnaja deklamis poemojn de D'Annunzio kaj de Dante tradukitajn esperanten kaj originalajn poemojn de Baghy kaj Schwartz; s-ino Haudebine prelegis pri la rekta instrumentado de Esperanto kaj legis elvokantan prozon titolitan „Sopiro al paco”; Boriŝa Miliĉeviĉ rakontis amuzan historieton. Kelkaj muzikludistoj nin regalis per fortepianaj kaj violonaj ludoj. Okazis ankaŭ la Oratora Konkurso, kiun partoprenis 3 junuloj el Aŭstrujo kaj Germanujo, kiuj vigle oratoris pri variaj kaj interesaj temoj. Kiel la juĝantaro decidis pri la konkurso, vi povos legi en la sekvanta nro.

Sabaton okazis la laŭvola ekskurso al Gran Sasso (= Ŝtonego), en kiu partoprenis proksimume 60 kongresanoj, el kiuj ĉirkaŭ 30 atingis la pinton, la plej altan de tuta Apenino kaj de la tuta duoninsula Italujo pro siaj 2914 metroj, kaj estis rekompenctaj pro la longa supreniro de la admirinda pejzaĝo, kiun la vetero fine ebligis vidi, post longaj horoj da griza nebulo. Sur la pinto de Gran Sasso, en la kajero kie kolektiĝas la subskriboj de la grimpintoj, estas paĝo kiu memorigas pri la ekskurso de T.E.J.O., kaj speciale de la ĉietrovebla Ovo-Klubo.

La muskolan forton la kuraĝaj grimpintoj devis ankoraŭfoje pruvi dum la Kongresa Balo, kie tamen ili brile eltenis la lastan fortostreĉon de la kunveno tute same kiel la hejmerestintoj. Dum la balo okazis, daŭrigo sur p. 8

„ESPERANTO KAJ LIBERVOLA CIVILA HELPSERVO INTERNACIA”.

(Civilservo).

Certe multaj el vi jam aŭdis paroli pri LCHI, kiu laboras en la sama spirito kiel Esperanto sed diversmaniere.

La LCHI organizas ĉiujare laborkampojn en multaj landoj, kiu kunigas gevolontulojn de nombraj landoj por fari kune dum siaj ferioj (kaj ne ricevante salajron) utilan laboron, kies profituloj estas malriĉaj grupoj.

La laboro ne postulas teknikajn konojn sed nur bonvolemon. Oni ofte laboras per ŝoveliloj kaj pioĉoj aŭ penikoj. La virinoj mastrumas aŭ faras ne lacigan laboron.

Tiel, LCHI intencas krei interkontaktojn kaj amikecon inter personoj de diversaj landoj. (ĉu komuna penado ne estas bona rimedo por amikiĝi?). Plie, ĝi volas elpruvi al tiuj, kiuj ne kredas tion ebla, ke la diversaj popoloj povus havi kontaktojn ne nur sur la batalkampoj sed ankaŭ sur la pacaj laborkampoj por fari laboron utilan por la homaro.

Kaj LCHI deziras starigi modelon de nova landservo, kiu povus iam anstataŭi la militservon.

Ofte iu laborkampo kunigas gevolontulojn el 10,12 landoj, kaj kompreneble la lingvoproblemo estas grava afero. Kutime, oni parolas la lingvon de la lando, kie okazas la laborkampo, kaj ankaŭ la germanan, la anglan, la francajn lingvojn. Okazas tempoperdoj por la tradukoj kaj kelkfoje miskomprenoj.

Kelkaj Esperantistaj Gecivilistoj proponis la enkondukon de Esperanto por faciligi la internaciajn rilatojn kaj ofte propagandis por Espe-

ranto al la eminentuloj de la LCHI. Sed, ĝis nun, se ili renkontis simpatian, ili ne ricevis la oficialan subtenon de la estraro, kiu nur povus adoptigi kaj disvastigi Esperanton en LCHI.

Pluraj Esperantistaj Gecivilistoj denove pripensis la problemon, kaj serĉis alian rimedon por atingi sukceson. Ili opinias, ke simpla maniero elpruvi al la estraro de LCHI kaj al la Civilistoj la grandan taŭgecon de Esperanto por la internaciaj rilatoj estus, ke multaj Esperantistoj de diversaj landoj renkontiĝu en la laborkampoj de la LCHI. La faktoj propagandus por nia lingvo pli bone ol ĉiuj propagandaj paroladoj.

Do, venu, enskribiĝu por labori en la LCHI. Vi trovos simpatian medion, certe pli favoran al Esperanto ol multaj aliaj medioj.

Kiam la lokoj kaj la datoj de la diversaj laborkampoj estos fiksitaj por tiu jaro, ni konigos ilin al vi per la esperantista gazetaro. Sed, de nun, la interesuloj povas sin turni al Service Civil Volontaire International Bureau International 77 Boulevard Jean Jaurès Clichy Seine France por peti informojn, aŭ al la nacia sekcio de la LCHI de sia lando, se ekzistas sekcio.

La Esperantistaj Gecivilistoj estas petataj ankaŭ skribi al tiu oficejo favore de Esperanto. Ili povus peti, ke estu esperanta parto en la internacia bulteno de LCHI.

Por la Esperantistaj Gecivilistoj
Geo Perra kaj René Lemaire
Lyon, 8 rue Saint Charles, France.

EL LA NOVA ESPERANTISTA VIVO EN HUNGARLANDO.

La hungara radio en sia finnlingva duonhora sciigis la 31.-an de aŭgusto, ke okaze la pac-amika kunveno de sudhungarlandaj esperantistoj en Hódmezővásárhely oni prezentis lumbildojn pri la agado de finna pac-komitato en urbo Turku kaj pri Finnlando. Kompletigante la sciigon ni aldonas, ke la kunvenon aranĝis la tre fervoraj gesdoj en la nomita urbo sub gvido de s-ino Julia Tóth. La regionan kunvenon - la unuan post multaj jaroj en tiu lando - partoprenis ankaŭ deko da s-anoj el Budapeŝt kaj geedzoj Kondor el la okcidenta urbo Vasvár. Priparolinta la nunajn laboreblecojn, oni decidis fari kurson kaj fondi rondon en tiea balancilfabriko kaj ageme kunlabori laŭ eblecoj en packomitatoj kaj en kulturhejmoj. Pri la kunveno aperis favoraj raportetoj en tieaj lokaj gazetoj. Ĉeestis inter aliaj sdoj Julio Baghy, P. Balkányi, dro Szemenyer. En la novfondita „Paco” Esperanto Rondo ĉe la Kulturhejmo de la V-a distrikta Konsilantaro - adreso Budapeŝt V. Engels-tér -, kunvenas jam regule ĉiujauĉe 40-60 personoj. La 1-an de sept. kunlaboranto de la budapeŝta centro de la Demokrata Mondjunulara Federacio, s-ano László Tiszai faris detalan hungarlingvan paroladon antaŭ multaj gastoj - inter ili ankaŭ delegito de la distrikta Konsilantaro kaj juna bulgara sdo - pri la grandioza junulara mondkunveno en Varsovio. Post unu-hora montro de filmo pri tiu Festivalo li daŭrigis raportante pri la

Esperantista Junulara Packunveno en Varsovio kaj pri vizito ĉe klubo de la Asocio de Esperantistoj en Pollando, pri la tre afabla akcepto tie, kie li konvinkigis pri rekta praktika kaj facila uzado de Esperanto. Li sciigis, ke la nomita Mondjunulara Federacio - adreso Budapeŝt, VI. Benzur u. 36 - pritraktos proponon por pli vasta utiligo de Esperanto ĉe la Festivalo en 1957 en Moskvo kaj pri ebla eldono de esperantlingva junulara presaĵo, se el diversaj landoj alvenos multaj petoj kaj interesiĝoj. Ĝi eldonas en 14 lingvoj junularan revuon kaj estus ebleco en tiuj ankaŭ aperigi sciigojn pri la junularaj esperantaj agadoj. La Federacio estas preta ankaŭ akcepti inter siajn membro-organizaĵojn la esperantistajn junularajn organizaĵojn. Do uzu multnombre la eblecon, kio precipe en orienteŭropaj landoj fortigos la uzadon de Esp., sed povas efiki tutmonde en 92 ŝtatoj. La nova budapeŝta Esp. rondo decidis aranĝi la 17-18-an de septembro modestan landan labor-kunvenon. Ĝi petas alsendon de ĉiaspecaj esp. presaĵoj, gazetoj, afiŝoj, libroj, ktp. por helpi vigligon de la hungara laboro. Oni ankaŭ laŭtlegos dum siaj semajnaj kunvenoj ĉiajn salutojn! Vizitontoj de Hungarujo anoncu sian alvenon!

Pri la esp. kunvenejo en Budapeŝt donis sciigojn du ĵurnaloj kaj la hungara radio. Estus tempo, ke al la lasta multaj skribu kaj petu regulan semajnan esp. lingvan disaŭdigon pri hungaraj vivo, lando kaj kulturo.

P. B.

daŭrigo de p. 6a

kompreneble, la lasta kunsido de la Ovo-Klubo, kaj s-ino Burgler solene premiis la gajnintojn de la okazintaj konkursoj kaj la gajnintan grupon.

Dimanĉon la Kongreso fermigis per la laŭvola vizito al Romo, gvidita de

Giorgio Bronzetti kaj Nicola Minnaja, dum kiu la proksimume 25 partoprenantoj povis ĝui la ĉiaman ravenon, kiun la Eterna Urbo honteme duonkaŝas en ĉiu angulo kaj triumfe elmontras en ĉiu monumento.

Bleadon, Weston-Super-Mare, Anglujo.

Ĉu vi povas imagi simplan lignan kabanon, kiu staras sur sunhela deklivo de la montetoj „Mendip”? Mal-supren etendiĝas frambokampo, kies belodoro tentas la palaton: supren oni povas grimpi inter flava uleksaro, ĝis finfine, atinginte la supron, oni povas migri perokule en ampleksa rondo. Sudokcidente la lasta rondo de la montetoj malaperas en la maron, kvazaŭ monstra baleno kuŝanta sur la marbordo apud „Weston”; kaj longe for en la distanco, blujaj kaj misteraj, kiel someraj nubetoj supermare, ŝvebas la montetoj „Quantock”. Pli oriente etendiĝas la vasta ebenaĵo de „Somerset”, kaj preskaŭ nevideblas la turo sur la mistera „insulo” de Glastonbury.

Ĉi tiu kabano kaj ĝia diversaspekta ĉirkaŭaĵo estas la libertempejo de la Bristola Esperantistaro. Dum la tuta jaro ni povas bicikli ĉi tien, por labori sur la frukta bieno kaj vagadi sur la montoj. Plej ĝoja estas la sezono de rikolto, kiam oni povas ĝis-sate gustumi je dolĉaj verdpizoj, sukaj framboj, dikaj fragoj, kaj - eĉ pli lukse - etaj ĉerizprunoj, kiuj pendas preskaŭ en la buŝon, dum oni preterpasas la pezajn branĉojn. Tamen, ne forgesu, ke kiu deziras manĝi, devas ankaŭ doni helpon al la farmisto: tio estas la fundamenta leĝo de nia tendaro.

Malfermu la pordon de la kabano kaj eniru!

Jen staras malgranda tablo, olea forno, benko, seĝo, telerŝranko, kaj ĝuste kontraŭ la muro, kvar litoj, unu super alia kiel sursipe. Tra la malfermita pordo venas la dolĉakraodoro de brulanta ligno, en kiu restiĝas terpomoj. Se vi deziras resti dum la nokto, eltiru el sub la tablo la feran keston, plenan de lankovriloj.

Eble la unuan fojon ĉi tie, vi ne povas longe dormi; ĉar tre frue matene komenciĝas la birda horo kaj la saltado de multaj ungetoj sur la tegmento. Sed ne domaĝu la dormon! Kiam vi malfermos la pordon, kaj viĝos la freŝan belon de la naturo, vi mem partoprenos la ĝojegon de la birdoj.

„Kuniĝu la fratoj, plektiĝu la manoj,

Antaŭen kun pacaj armiloj.

Kristanoj, hebreoj aŭ mahometanoj

Ni ĉiuj de Di' estas filoj.

Ni ĉiam memoru pri bon' de

l' homaro

Kaj malgraŭ malhelpoj sen halto

kaj staro,

Al frata la celo ni iru obstine

Antaŭen, senfine.

Alilandaj Esperantistoj kun junaj koroj akceptu inviton libertempi en nia kabano tute senpage. S-ro G. B. Tordoff, 82, Pendennis Park, Bristol 4, Anglujo, nun pretigas programon por 1956. Skribu al li.

Veraj amulet-rememorigaĵoj de Afriko. Nun estas haveblaj en malgranda kvanto amuletoj, kiuj vere protektas vin kaj donas al vi bon-sorton, se vi kredas je tio. Unu vera specimeno kaj la sendado rekte al vi kostas entute nur 2.50 fl. aŭ egalvaloron.

L. Heilberg, Poste Restante, KITWE, Northern Rhodesia.

„Kie estas mia „hunda” knabo kun la bukraj haroj?” la instruisto de la Reĝa Akademia Lernejo demandadis, kiam li ne trovis la knabon, Landseer en sia klaso. La respondo ĉiam estis „Ĉe la Bestgardeno”, ĉar ĉi tiu knabo, kiam li ne estis en la lernejo, pasigis tie sian tempon. En ambaŭ lokoj li daŭre studis bestojn kaj pentris ilin. Hundoj plej plaĉis al li kaj lia unua pentraĵo, publikigita, estis pri granda „St. Bernard”.

„Batalintaj Hundoj Refortigās” unue alportis al li famon. Lia Londona studejo estis plena de hundpentraĵoj grandaj kaj malgrandaj, furiozaj kaj mildaj ĉiuj tiel vivsimilaj, ke vizitantoj haltadis ĉe la pordo kaj ekkriadis, „Landseer, detenu viajn hundojn.”

Kvankam li speciale amis hundojn, Landseer vere amis ĉiujn bestojn. Unu tagon, en Skotlando, oni kondukis lin al cervĉaso, kaj kiam li kaj lia gastiganto embuskis, belega cervo aperis. Dum la gastiganto ĝentile atendis, por ke Landseer povu pafi, la artisto faligis sian pafilon, kaj prenante el sia poŝo kraĵonon kaj paperblokon, li komencis skizi la belegan beston.

Landseer povis skizi rapide kaj facile. Estas rakonto, ke unu tagon, li samtempe skizis cervkapon per la dekstra mano kaj ĉevalkapon per la maldekstra mano. Eble la rakonto estas vera, ĉar li povis skizi preskaŭ egale bone per ĉiu mano.

De sia knabeco, kiam li havis dek unu jarojn kaj gajnis arĝentan paletron de la Societo de Artoj, en Londono, Landseer gajnis sukceson post sukceso. Frue, li iĝis ano de la Reĝa Akademio; li ĝuis la patronadon kaj amikecon de la Reĝino Viktorino; li estis kavalirigita, kaj la prezidantecon de la Reĝa Akademio oni proponis al li. Post lia morto en 1873, oni enterigis lin en la Katedralo, Sankta Paŭlo.

El liaj multaj hundpentraĵoj „La Ĉeffunebranto de la Maljuna Ŝafisto” estas eble la plej bonekonata.

Liaj cervoj estas tiel popularaj kiel liaj hundoj, kaj el ĉi tiuj, la „Monarko de la Valetoj” estas favorato.

Krom siaj bestbildoj Sir Edwin Landseer pentris multajn portretojn de famuloj.

La bonekonataj leonskulptaĵoj en „Trafalgar Placo”, Londono, estas ankaŭ liaj verkaĵoj.

MUŜO NAĜAS EN LA GLASO.

Je iu varma somertago, anoj de kelkaj popoloj kaj landoj sidis en iu pariza kafejo - kaj intencis trinki aperetif-on. La glasoj jam staris sur la tabloj. Subite ĉiu rimarkis, ke muŝo naĝas en sia glaso - kaj oni tute diverse reagis je tiu malgrandajo.

La germano elfiŝis la muŝon kundentligneto, diris: „sanon” kaj trinkis. La franco kun afablaj vortoj re-

donis sian glason kaj petis la kelneron pri nova aperetifo. La usonano frakasis la glason en angulon kaj forlasis la kafejon. La hino elhokis la muŝon - kaj manĝinte ĝin, li lasis stari la trinkaĵon. La eskimo englutis la aperetif-on kune kun la muŝo. Sed la anglo alvokis la kelneron. „Vi miskomprenis min”, li diris, „mi deziris viskion kun gasakvo.”

LA JAPANAJ INFANOJ EKSPOZICIAS EN SAINTES.

Dum la Kristnaskaj festoj, kultura manifestacio modesta sed signifoplena okazis en nia urbo. De la fino de la dua mondmilito la internacia organizo U.N.E.S.K.O. deĵoris por kunligi ĉie en la mondo la agadojn de tiuj kiuj verkas por la riĉigo de la kulturo de la scienco kaj de la scioj. Pro tio, inter multaj aliaj aktivaĵoj, la respondeculoj de U.N.E.S.K.O. organizis nombrajn ekspoziciojn de infanaj desegnaĵoj montrantaj realan artan valoron, cele atentigi la publikon pri iu el la plej nekonataj formoj de la homa genio: la infana arto.

Tial, laborante kun la japanaj instruistoj, la Grupo esperantista de Saintes (Francio) deziris alporti sian kontribuon je tiu monda ĉeno da ekspozicioj. S-ro Petro Germen, instruisto, dank'al la lingvo internacia Esperanto, povis korespondi kun la edukistoj de Kioto kaj interŝanĝi infanajn desegnaĵojn regionajn kontraŭ verkoj de japanaj infanoj.

Tiuj, dum ok tagoj, estis ekspoziciataj ĉe la Klubo de la Junularo Es-

peranta Santona (Esperanta Kelo, 10 strato St. Miĉel), kie la vizitintoj povis taksi la fantazion kaj la Strangaĵojn de la orienta arto en verkoj en kiuj la riĉeco de la elpenso kontraŭbatalas la spontaneeon de la kredo.

Inter tiuj pentraĵoj nesamvaloraj ni rimarkis „Noktan papilion” kun varmaj kaj ombrumigitaj tonoj, pladon kun rektaj tintoj bluaj kaj ruĝaj, „Batalon de flugantaj teleroj” (rebrilo de la aktualajo) kaj fine „Lukton de glavistoj” sur monto, temo traktita laŭ la plej pura surrealista stilo, en kiu la akreco de la batalo kaj la sovaĝeco de la pejzaĝo estas esprimitaj de intensegaj „tuŝoj” sang-ruĝaj, nigraj, violkoloraj en diaboĉo de krudaj koloroj.

Tiu malkompleta priskribo montras vivan pruvon pri la ekzisto de la Esperantismo en nia urbeto, sub la stimulo de la Junul-sekcio.

IVO.

(laŭ la raportoj de la regiona gazetaro)

ĈU VERE?

En iu eta komunumo la pastro estas mortinta. La preĝeja servisto fiksis afiŝon sur la preĝeja pordo:

„La pastra moŝto hodiaŭ matene forlasis la teran mondon, por hejmeniri al la ĉielo.”

Unu horon poste, oni povis legi sub tio: „La pastra moŝto je la dua positagmeze ankoraŭ ne estas alveninta en la ĉielo. Ni estas tre zorgoplenaj. Petro.”

ANKAŬ KOMPLIMENTO.

Li: „Ĉu vi iam ajn amis viron antaŭ mi?”

Ŝi: „Ne Hoĉ, mi ofte ŝatis virojn pro ilia kuraĝo - ilia forto, ilia beleco,

ilia lerteco - sed ĉe vi estas nur amo, Hoĉjo, nenio ol amo!”

Hotero.



KORESPOND- ADRESOJ

Ĉiu abonanto, aŭ grupo foje po jure rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.

Bulgarujo: Bulgaraj studentoj dez. kor. pri ĉiaj temoj. Certa resp. Adresu vian leteron al Hristo Borisov, Instituto „P. Beron” KOLAROVGRAD.

Interŝanĝas neuzitajn p.m. en kompletaj serioj Sro Marin W. Koev, str. Ĉumerna 6, Kazanlik.

Hungarujo: Sendu koresponddezirojn, esp. presajojn al „PACO” Esperanto Rondo, BUDAPEST V. Kultur-otthon, Engels tér.

Germana Demokrata Respubliko: 25

j. inĝ. stud. (min-ekspuato) Heinz Heyroth, Lutherstadt Esileben, Rathenastr. 7, dez. kor. ĉefe kun Italujo, Portugalujo kaj ekster-eŭropaj landoj. Certa respondo.

Japanujo: F-ino Ikuyo Umeyama, 21 j. instruistino, Samei, Sue-mura, Kuma-gun, KUMAMOTO-KEN, dez. kor. kaj interŝ. bildkar-tojn, p.m. Certa resp.

Uruguay: Sro Alberto M. Mathon, Strato Hector Miranda 383, CANELONES, dez. kor.



Kiu faros la plej spritan rakonton?
Ni lotumos 2 premiojn!

Sendu vian rakonton antaŭ la 1a de
decembro 1955a.